



La kaŝita flanko de la elektraj veturiloj



La elektra aŭto kaj la elektrohelpata biciklo plene prosperaj prezentas bildon de neta energio.

Tamen, la elektraj veturiloj havas kaŝitan flankon. Ĉu ili tiom respektas naturon kaj homojn kiom oni prezentas ? En tiu-ĉi elsendo vi trovos elementojn de respondo.

La elektra aŭto kaj la elektrohelpata biciklo plene prosperaj prezentas bildon de neta, ekologia energio, bildo de veturiloj ne elĵetantaj poluantajn fumojn. Tamen, la elektraj veturiloj havas kaŝitan flankon. Por fabriki la bateriojn, oni bezonas du komponantojn : kobalton, kiu plejparte venas el kongolandaj ordinaraj minejoj, kaj lition, venante ĉefe el treege sekaj regionoj de Sudameriko. La elfosado de litio postulas multege da akvo, kaj tio minacas multajn agropaŝtistojn dependantajn de la akvo por pluvivi.

La elfosadon de la kobalto oni faras en danĝeraj senprotektaj minejoj kiuj konstante povas kolapsi. La laboristoj, inklude infanoj, laboras per nudaj manoj kaj sen ŝirmomaskoj, kvankam la enspiro de kobalto-polvo kaŭzas mortigajn pulmo-malsanojn. Kaj finfine estas la problemo de la recikligo, ĉar nuntempe en Eŭropo, oni recikligas nur 5 % de la baterioj, kaj tiujn pere de kemiaĵoj. Aliflanke, la ne-recikligitaj baterioj eligas toksajn gasojn kaj poluas la grundon. Tiel, je plia pripensado la elektraj veturiloj ne tiom respektas naturon kaj homojn kiom dirate. Tamen, danke al ili, floras merkato de miliardoj, kaj la tradiciaj energioj kiel la dizelo estas fifamigitaj.

de j.l.

Fontoj:

<https://www.letemps.ch/economie/lithium-cobalt-producteurs-doivent-faire-face-leurs-responsabilites>
<https://e-rse.net/batteries-voitures-electriques-impact-environnement-27293/#gs.k2Odzx8>
<https://www.agoravox.fr/tribune-libre/article/la-pollution-des-batteries-au-190131>
<http://graindesel-com.over-blog.com/2017/02/le-scandale-des-enfants-du-cobalt.html>

Ankaŭ tio povus interesi vin:

#ElektraAuto - aŭto - www.kla.tv/ElektraAuto

Kla.TV – Novaĵoj alternativaj ... liberaj – sendependaj – necenzuritaj ...



- ➔ Tio kion la amaskomunikiloj devus ne kaŝi ...
- ➔ Tio pri kio oni aŭdas malmulte, de la popolo por la popolo...
- ➔ Regulaj informoj ĉe www.kla.tv/eo

Indas resti ĉe ni!

Senpaga abono al nia retpoŝta informilo ĉi tie: www.kla.tv/abo-en

Sekureca Avizo:

Kontraŭaj voĉoj bedaŭrinde estas pli kaj pli cenzuritaj kaj subpremitaj. Tiom longe kiom ni ne orientiĝas laŭ la interesoj kaj ideologioj de la gazetara sistemo, ni ĉiam sciu, ke troviĝos pretekstoj por bloki aŭ forigi Kla.TV.

Do enretiĝu ekstere de interreto hodiaŭ! Klaku ĉi tie: www.kla.tv/vernetzung&lang=eo

Licenco:  *Licence Creative Commons kun atribuo*

Oni rajtas distribui kaj uzi nian materialon kun atribuo! Tamen la materialo ne povas esti uzata ekster kunteksto. Sed por institucioj financitaj per la aŭdvida imposto, ĉi tio estas permesita nur kun nia interkonsento. Malobservoj povas kaŭzi procesigon.